

Janvier - février
Januaro - februaro
2011

Esperanto la verda stelo



ASSOCIATION
ESPÉRANTISTE
Dumonata revueto
numero 65

esperanto94.info

KALENDARO

P
O
L
O
G
N
E



Bjalistoko : Centro Ludoviko Zamenhof vidata el korto
Bialistok : Centre Ludoviko Zamenhof vu de la cour

<http://www.centrumzamenhofa.pl/index.php>

Assemblée Générale
sam, Le 5 février 10 h
2-4 rue Eugène Brun
94500 Champigny/Marne

Esperanto-Renkontiĝo ĉe
Mediterraneo en Seto
22a - 26a de aprilo 2011

La koncerto de Interkant'
la 8an de majo aŭ
la 19an de junio 2011.
Informo venontfoje



Zamenhof juna

La Centro Ludoviko Zamenhof de Bjalistoko en Pollando proponas plurajn ekudajn projektojn destinitajn por diversaĝuloj, tre diversajn, ne tedajn, sed aktivigajn al la partoprenantoj.



Le Centre Ludoviko Zamenhof de Bialistok en Pologne propose plusieurs projets éducatifs adaptés à des âges différents, pas ennuyeux, mais rendant actifs les participants.

KALENDARO 2011 : 4 €

Por via uzo,

Por donaci

Por propagandi




Bonne et heureuse année 2011




Bonan kaj feliĉan jaron 2011

<p>p. 2 Rencontre espérantiste à Moret sur Loing. p. 3 Yogourt « Sojasun ». Festival de chorales. p. 4 Un cours sur le net pour Chinois. p. 5 Monsieur Miyoshi et la publicité dans « Le Monde ». p. 6 Faire des cadeaux. Liste d'éditeurs « Google ». p. 7 Favorables à l'espéranto. Congrès. p. 8 Aktiv' Espéranto</p>	<p>p. 2 Esperanto-renkontiĝo en Moreo ĉe Loengo. p. 3 Jogurto « Sojasun ». Ĥorfestivalo. p. 4 Pri ret-eldonaĵo por Ĉinoj. p. 5 Sinjoro Mijoŝi kaj propagando en « Le Monde ». p. 6 Fari donacojn. Eldonejo « Google » p. 7 Favoraj al Esperanto. Kongresoj. p. 8 Aktiv' Esperanto.</p>
<p>Imprimerie Spéciale</p>	
<p>Poŝtadreso : LA VERDA STELO – ESPERANTO 94 3 Rue Pablo Picasso Appartement 507 94600 Choisy le Roi Francio / France</p>	<p>Prezidanto : Tereza Sabatier : terezasa@club-internet.fr Sekretariino : Sylviane Lafargue Redaktorino : Tereza (☎01.45.76.10.57) Kasisto : christianvacheron @free.fr Korektantoj : Nikolao, Vito Sendanto : Oktavio</p>

La Anoncetoj

RENCONTRE ESPERANTISTE A MORET/LOING	ESPERANTO RENKONTIĜO EN MORETO/LOENGO
<p>Programme de la rencontre départementale du</p> <p>5-a de junio 2011 en Moret sur Loing;</p> <p><u>10-a : Rencontre matinale au salon communal (café, gâteaux...)</u> <u>12-a : Repas en commun au restaurant (crêpes ou traditionnel)</u> <u>14-a : Visite du village du moyen âge de Moret sur Loing</u></p> <p>A l'époque une ville royale fortifiée, à la porte du comté de Champagne. Son histoire commença à se développer au 11e siècle grâce aux premiers rois capétiens. Philippe Auguste commence les premières fortifications mais c'est Charles le VII, qui modernis les ramparts après la libération de la ville de l'occupation britannique de 1420 à 1430. La tour principale construite pendant le règne de Louis VI a été améliorée par Henri IV pour sa belle, Jacqueline De Breuil, comtesse de Moret. Fouquet en défaveur y fut emprisonné en 1664. Napoléon y dormi après son retour de l'île d'Elbe. Le peintre Sisley vécut à Moret de 1889 jusqu'à sa mort en 1899. Theodore Rousseau, Pissarro, Picabia, Segonzac peignirent aussi à Moret. Le siège de l'ordre des Bénédictines fondé au XVII siècle, réputé pour sa fabrication de sucres d'orge fut créé en 1638.</p>	<p>Programo de la departementa renkontiĝo de la</p> <p>5-a de junio 2011 en Moreto ĉe Loengo</p> <p><u>10-a : Interkona mateno en urba salono (kafo, kukoj...)</u> <u>12-a : Komuna tagmanĝo en restoracio (krespejo aŭ tradicia)</u> <u>14-a : Vizito de la mezepoka vilaĝo Moret ĉe Loengo</u></p> <p>Iama fortikita reĝa urbo, je la pordoj de Graflando Ĉampanjo,. Ĝia historio ekpliampleksiĝis je la 11-a jar-cento danke al la unuaj kapetidaj reĝoj. Philippe Aŭgusto ekas la unuajn fortikaĵojn sed estas Karlo la VII-a, kiu modernigas la remparojn post liberigo de la urbo de brita okupado de 1420 ĝis 1430. La ĉefturo, konstruita dum la regado de Ludo-viko la VI-a, estis plibonigita de Henriko la IV-a je la profito de lia amatino, Jaklino de Brejlo, grafino de Moreto. Fuketo estis enŝlosita post sia malfavoro en 1664. Napoleono dormis tie post reveno de insulo « Elba insulo». La pentristo Sisleyo vivis en Moreto de 1889 ĝis sia morto en 1899. Teodoro Ruseo, Pisaro, Pikabio, Segonzako ankaŭ pentris en Moreto. Sidejo de Benediktina Monaĥinejo fondita je la XVII-a jarcento, fama pro fabrikado de aromsukeraĵo estis kreita en 1638.</p>
	<div style="border: 1px solid black; padding: 5px;"> <p>ESPERANTO VAL DE SEINE, Madeleine Crépatte près de (apud) Melun. Organisatrice (organizantino) Moret sur Loing Tel : 0683429908 raymonde.coquisart@yahoo.fr</p> </div> 
RIONS UN PEU	NI IOM RIDU
<p>Deux chauves-souris papote, la tête en bas. -- Tu n'as pas peur de la vieillesse toi ? -- Bof, non. Une chose m'angoisse un peu toutefois. -- Ah ! bon, et c'est quoi ? -- Tu as déjà pensé à ce qui se passerait, si nous devenions incontinentes ?</p>	<p>Du vespertoj babilas, kapon malsupre. -- Ĉu vi ne timas maljunecon ? -- Be, ne. Tamen io maltranviligas min. -- Kial do ? Diru. -- Ĉu vi ne jam pripensis, kio okazus, se al ni ne plu eblus reteni urinon ?</p>
	

YOGOURT SOJASUN EN ESPERANTO	SOJASUN-JOGURTO EN ESPERANTO
<p>Le salon professionnel SIAL a eu lieu à Paris du 17 au 21 octobre 2010. Parmi plus de 5000 stands, un des plus importants était celui de l'entreprise Triballat. On pouvait y voir, parmi d'autres produits et nouveautés, un paquet de yogourts « Sojasun » en espéranto ! C'est un prototype présenté à la candidature du prix de la nouveauté. C'est la société LinguaForce de Rennes qui en a fait la traduction.</p> <p style="text-align: right;">Selon [Komerco-IKEF]</p>	<p>La profesia ekspoziciego SIAL okazis apud Parizo inter la 17-a kaj la 21-a de oktobro en 2010. Inter ties pli ol 5000 budoj, unu el la grandaj estis tiu de entrepreno Triballato. Sur tiu ĉi, kune kun diversaj produktoj kaj novaĵoj, videblis pakaĵo de la jogurtoj « Sojasun » tute en Esperanto ! Ĝi estis prototipo tie prezentata estanta kandidato por novig-premio. Esperantigis ĝin la kompanio LinguaForce en Renno.</p> <p style="text-align: right;">Laŭ [komerco - IKEF]</p>
<p>FESTIVAL DE CHORALES... ET L'ESPERANTO !</p>	<p>ĤORFESTIVALO ... KUN ESPERANTO !</p>
<p>Dans le centre culturel bondé de Bredere (au bord de mer en Belgique) s'est déroulé le 14 novembre un festival de chorales intitulé « Chorales dans tous les états », avec 300 personnes, 6 chorales, dans 3 villes de Flandre : Bredene, Ostende et Veurne.</p> <p>Au programme des chants de plusieurs pays, donc en diverses langues, pas seulement européennes (Belgique, Grande Bretagne, France; Espagne, Italie, Hollande, Finlande, Russie...) mais aussi des autres continents (Indonésie, Israël, Jamaïque, Cuba, Afrique du Sud, Etats Unis).</p> <p>Ce fut l'apothéose à la fin du festival, lorsque les 6 chorales entonnèrent ensemble « L'hymne à la joie » en espéranto. Avec enthousiasme les spectateurs applaudirent chaudement et demandèrent de bisser, ce que les choristes firent de bon cœur, accompagnés de quelques spectateurs, qui trouvèrent le texte sur la dernière page du programme.</p>	<p>En la plenplena kulturcentro de Bredeno (ĉe la belga marbordo) okazis la 14-an de novembro ĥorfestivalo sub la titolo “<i>Ĥoroj en ĉiuj ŝtatoj</i>“, kiun ĉeestis pli ol 300 personoj; partoprenis ĝin 6 ĥoroj el 3 flandraj urboj : Bredene, Oostende kaj Veumo.</p> <p>En la programo estis kantoj el pluraj landoj, kaj do en diversaj lingvoj, ne nur el Eŭropo (Belgujo, Britujo, Francujo, Hispanujo, Italujo, Nederlando, Finnlando, Rusujo, ...) sed ankaŭ el aliaj kontinentoj (Indonezujo, Israelo, Jamajko, Kubo, Sud-Afriko, Usono, ...).</p> <p>La apoteozo okazis je la fino de la festivalo, kiam la 6 ĥoroj ekkantis kune “<i>la himnon al la ĝojo</i>“ en ... Esperanto. Entuziasme la ĉeestantoj forte aplaudis kaj bisis, kion afable faris la ĥoristoj, akompanataj de kelkaj spektantoj, kiuj trovis la tekston sur la lasta paĝo de la programo.</p>
<p>DES TEXTES DE CLAUDE PIRON</p>	<p>TEKSTOJ DE CLAUDE PIRON</p>
<p>On peut entendre plusieurs de ses interventions sur « Youtube » : Claude Piron (1931-2008) auteur entre autres oeuvres de « Le défi des langues ». Il apprit l'espéranto seul et tout jeune, grâce à une brochure trouvée dans son grenier. Il fut également traducteur à l'ONU. Par ses conférences, ses textes, il apporte des arguments à toutes les critiques non fondées qui sont faites à l'espéranto.</p> <p style="text-align: right;">claude piron;youtube</p>	<p>Eblas aŭskulti plurajn el liaj intervenoj en « Youtube » :</p> <p>Klaŭdo Pirono (1931-2008), aŭtoro inter aliaj verkoj de « La defio de la lingvoj ». Li juna lernis sola esperanton, danke al broŝuro, kiun li trovis en subtegmentejo. Li estis ankaŭ tradukisto en UNO. Per siaj konferencoj, siaj tekstoj, li donas argumentojn al ĉiuj senfundaj kritikoj, faritaj al Esperanto.</p> <p style="text-align: right;">claude Piron;youtube</p>
<p>RIONS UN PEU</p>	<p>IOM RIDU</p>
<p>-- Tu imagines, ma femme me trompe, et même en plus elle ment ! -- D'où tiens-tu qu'elle ment ? -- Elle est rentrée tôt ce matin, et elle a dit, qu'elle avait dormi chez sa sœur. -- Et qu'est ce qui te fait dire, qu'elle ment ? -- Du fait que moi-même j'ai dormi chez sa sœur !</p>	<p>-- Imagu, mia edzino trompas min, kaj aldone ŝi eĉ mensogas! -- De kie vi scias, ke ŝi mensogas ? -- Ŝi venis hejmen hodiaŭ frumatene, kaj ŝi diris, ke ŝi dormis ĉe sia fratino. -- Kaj de kie vi scias, ke ŝi mensogas? -- De tie, ke mi mem dormis ĉe ŝia fratino.</p>



UN COURS SUR LE NET POUR CHINOIS	PRI RET-ELSENDAĴO POR ĈINOJ
<p>Le dialogue (un peu artificiel, mais bon) entre deux fillettes chinoises consiste en des questions-réponses simples, du genre "Qui es-tu ? comment t'appelles-tu ? où habites-tu ? comment vas-tu ? Etc. avec les réponses « ad hoc ».</p> <p>A la fin: "Dankon" "Ne dankinde" (merci, il n'y a pas de quoi). Drôlement chouettes ces fillettes ...</p> <p>Je suis persuadée que pour ces gamines (comme pour tout le monde d'ailleurs...) il est bien plus facile d'apprendre l'espéranto que l'anglais... Ce qui n'empêche pas d'ailleurs, qu'elles puissent apprendre la langue "oligar-chique" plus tard, si besoin.</p> <p>Mais pourtant, quantité de gens qui n'ont jamais daigné se pencher sur la question de l'espéranto affirment sans sourciller que : "l'espéranto est une langue trop européenne pour pouvoir être utilisée internationalement".</p> <p>En réalité il n'en savent rien, mais font la supposition (à partir de l'idée qu'ils se font de ce qu'est une langue, c'est-à-dire "seulement" un lexique), que des Asiatiques repousseraient a priori une "lingva franca" contenant du vocabulaire d'origine indo-européenne. Mais quelle langue leur propose-t-on en attendant ?</p> <p>Cherchez dans le</p> <p>La réalité traire, les Chinois, Coréens, Népalais, d'esprit critique... placés que nous pour constater que l'enseignement massif de l'anglais dans les systèmes éducatifs a des résultats bien piètres au regard du temps passé et des moyens nécessaires. Et quand ils sont correctement informés, ils acceptent l'espéranto pour ce que c'est : une langue rapide à apprendre, claire, ludique, sou-ple, facilitant d'autres apprentissages... et neutre géopolitiquement.</p> 	<p>La dialogo (iom artefarita ! Konsentite) inter la du knabinoj konsistas el simplaj demandoj-respondoj, kiel « Kiu vi estas ? Kiel vi nomiĝas ? Kie vi loĝas ? Kiel vi estas ? ktp. » kun taŭgaj respondoj.</p> <p>Je la fino « Dankon » « Ne dankinde » Multe bonaj tiuj knabinoj !</p> <p>Mi certas, ke por tiuj knabinoj (kiel por ĉiuj certe...) plej facilas lerni esperanton ol la anglan... Tio kio ne kontraŭas ke ili pli poste lernos la « oligarkian » lingvon, laŭbezone.</p> <p>Sed, tamen, kvanto da personoj, kiuj, neniam degnis pripensi la problemon pri Esperanto, certigas sen iu ajn dubo ke : « Esperanto estas lingvo tro eŭropeca por esti uzita internaciskale »</p> <p>Vere, ili scias nenion prie, sed supozas (bazitaj sur propra ideo pri kio estas lingvo, tio estas « nur » vortprovizo), ke Azianoj apriore rifuzas « lingvon frankan » havantan vortprovizon, kiu fontas hindo-eŭropece. Sed kion do ili proponas ? La course » !</p> <p>Trovu en la rezonado !</p>  <p>La realeco estas male, ke la Ĉinoj; Nepaloj, etc. havantaj kritikan spiriton... estas tiel bone lokitaj kiel ni por konstati ke amasa instruado de la angla en la edukaj sistemoj havas rezultojn tre malsukecaj kompare la tempon uzitan kaj la necesajn rimedojn. Kiam ili estas bone informitaj, ili konsentas konsideri Esperanton laŭ ĝia valoro : lingvo rapide lernebla, klara, ludeca, supla, propedeŭdika... kaj neŭtrala geo-politike.</p>
RIONS UN PEU	NI IOM RIDU
<p>Eugène était célibataire. Il vivait avec son père et travaillait dans l'entreprise familiale. Apprenant de son père malade, qu'il hériterait de lui une somme miraculeuse, il décida de se marier pour jouir de la vie avec une épouse.</p> <p>Lors d'une invitation, il remarqua la plus belle femme qu'il n'avait jamais vue. Son cœur se mit à battre la chamade.</p> <p>-- Je parais peut-être un homme ordinaire -- dit-il à la femme de ses rêves--, mais dans quelques années, quand mon père mourra, j'hériterai de 65 millions d'euros !</p> <p>A cette nouvelle fascinante la jeune belle demanda sa carte de visite, et trois jours après elle... devenait la belle-mère d'Eugène.</p> 	<p>Eŭgeno estis fraŭlo. Li vivis kun sia patro kaj laboris en la familia entrepreno. Eksciinte de sia malsana patro, ke li heredigos al li miraklan havaĵon, li decidis edziĝi por pasigi la vivon ĝuante kun edzino.</p> <p>Dum iu akcepto li rimarkis la plej belan virinon, kiun li iam ajn vidis. Lia koro komencis bati maltrankvile.</p> <p>-- Eble mi ŝajnas esti ordinara viro -- li konfesis al la sinjorino de liaj revoj --, sed post kelkaj jaroj, kiam mia patro mortos, mi heredos 65 milionojn da eŭroj!</p> <p>Aŭdinte la fascinan novaĵon la juna belulino petis lian vizitkarton, kaj post tri tagoj ŝi ... iĝis la duonpatrino de Eŭgeno.</p>

<p>SINJORO MIYOSHI ET LE JOURNAL « LE MONDE » (le 16/12/2010)</p>	<p>SINJORO MIJOŜI KAJ LA ĴURNALO « LE MONDE » (la 16an/12/2010)</p>
<p><i>*La publicité de M. Miyoshi dans le journal « Le Monde » fut deux fois plus importante que d'habitude ! (* il s'agit d'un entrepreneur japonais, qui régulièrement fait de la publicité pour l'Espéranto dans différents et importants journaux européens). Dennis Keefe conseillait :</i></p> <p>Selon un point de vue mercatique, cette importance ajoutée à ces campagnes répétées certainement amplifieront l'effet de l'annonce de ce mois-ci. Cet effet durera quelques jours à un haut niveau et cela donnera aux espérantistes français une bonne chance pour profiter du haut niveau d'attention du public sur l'espéranto. Attention, toutefois, à la courte durée de ce haut niveau.</p> <p>Bien sûr je parle du groupe des lecteurs du «Monde » et pas de toute la population française. Pourtant, sachons que « Le Monde » est lu par beaucoup de décideurs partout en France et même à l'étranger des responsables de télévision, radio, presse qui s'informent grâce aux articles de ce journal.</p> <p>Si on veut à un moment quelconque contacter les mass média pour proposer un article, être interviewé, annoncer un cours, la période juste après l'annonce de M. Miyoshi est la meilleure dans l'année.*(diffusion en partie gênée par une grève des diffuseurs)</p> <p>En d'autres termes, cela renforce l'effet du travail de propagande des espérantistes à la puissance 5, 10 ou plus. Bien sûr, c'est difficile à prévoir, mais je ne serais pas surpris si le facteur était encore plus grand).</p> <p>Jusqu'à-là, dans les écrits des espérantistes en France, je n'ai pas vu d'actions supplémentaires pour accompagner ou suivre cette importante réclame. Cela va-t-il se produire ? On peut s'intéresser aux résultats, car ces résultats pourront aider non seulement M. Miyoshi pour renforcer l'effet des futures annonces éventuelles, mais aussi aideront au constat : les actions d'accompagnement sont-elles ou non efficaces au développement de l'espéranto ?</p> <p>Autrement dit, nous avons devant nous une vraie chance à utiliser le pouvoir d'information du journal «Le Monde » pour impulser des actions. Qui le fera ? Que fera-t-on ?</p> <p style="text-align: right;">* note de la rédaction</p>	<p><i>*Estas antaŭvidite ke informrekamo de Sinjoro Mijoŝi en la ĵurnalo « * Le Monde » estos duoble pli granda ol kutime ! (temas pri japana entreprenisto, kiu regule faras propagandon por esperanto en diversaj ĉefaj eŭropaj ĵurnaloj) Deniso Kefo tiel konsilis :</i></p> <p>Laŭ merkataka vidpunkto, tia grandeco aldona al la antaŭaj ripetataj kampanjoj probable multe pligrandigos la efikon de la ĉimonata anonco. Tiu efiko daŭros je alta nivelo dum kelkaj tagoj kaj donos al Esperantistoj en Francio tre bonan ŝancon profiti je eble la plej alta nivelo de publika prientento pri Esperanto. Ni tamen atentu, ĉar tiu ŝanco por efika kromagado restos je tre alta nivelo nur kelkajn tagojn.</p> <p>Kompreneble mi parolas pri la celgrupo de la legantoj de « Le Monde » kaj ne pri ĉiuj enloĝantoj de Francio. Tamen, ni memoru, ke « Le Monde » estas legata de multe da ĉefroluloj ĉie en Francio kaj eĉ translandlime: gravaj homoj ĉe televido, ĉe radio, ĉe la gazetaro informiĝas en la paĝoj de tiu ĵurnalo.</p> <p>Se oni iam ajn volas kontakti amaskomunikilon por verki artikolon, esti intervjuita, anonci kurson, la periodo tuj apud la anonco de Sinjoro Mijoŝi estos la plej bona momento de la jaro. *(striko limigis ĝian liveradon)</p> <p>Alivorte, ĝi pligrandigos la efikon de varbolaboro de Esperantistoj, ekzemple, je faktoro de 5, 10 au pli. (Kompreneble mi vere ne scias, sed mi ne estos surprizita se la faktoro estas eĉ pli alta.)</p> <p>Ĝis nun en la linioj de Esperanto en Francio, mi vidis nenion pri kromagado por akompani aŭ sekvi la grandajn informrekamojn. Ĉu okazos io ? Kio okazos ? Oni povas multe interesiĝi pri la rezultoj, ĉar tiuj rezultoj povos helpi ne nur al Sinjoro Miyoshi por pliefikiĝi eventualajn venontajn anoncojn, ili helpos konkrete ekkonstati kiaj kromagoj valoras, aŭ ne tiom valoras por antaŭenigi Esperanton .</p> <p>Alimaniere dirite, antaŭ ni prezentiĝas senprecedenca ŝanco por utiligi, per kromagoj, la informan potencon de tiu ĵurnalo « Le Monde. ». Kion oni faros ? Kion oni rekomendos ?</p> <p style="text-align: right;">* noto de la redaktando</p>
<p>Biographie (biografio)</p> <p>1939 Naît au Japon. Il est atteint de la poliomyélite à la jambe droite 1958 S'engage dans la compagnie familiale Swany, qui produit des gants 1962 Adhère à Oomoto 1978 Président de Swany Corp. 1995 Apprend l'espéranto 1998 Directeur de l'Association pour la</p>	<p>de M. Etsuo Miyoshi</p> <p><i>Diffusion de l'Espéranto</i> 2002 Campagne publicitaire sur l'espéranto: 24 fois en EU, 11 en France 2007 Membre Honoraire de l'Union Européenne d'Espéranto 2008 Prix pour établissement d'une nouvelle compagnie : la valise-bâton Walkin'Bag</p>

Dennis Keefe Universitato de Nankino, Ĉinio
eksinstruisto HEC, Ecole Polytechnique



<p>RIONS UN PEU</p>		<p>NI IOM RIDU</p>
<p>Le petit asticot demande à sa maman: - Maman, où est papa ? - Il est allé pêcher, mon petit...</p>		<p>La eta vermo petas al sia patrino : -- Panjo, kie paĉjo estas ? -- Li fiŝkapas, karulo...</p>

FAIRE DES CADEAUX	FARI DONACOJN
<p>Pour fêter la fin de 2010 et le début de 2011, avez-vous pensé que des livres sur ou en espéranto étaient d'agréables et utiles cadeaux ? Pour les espérantistes ou pour informer les non-espérantistes, voire enseigner la langue grâce à de bons livres de cours, des dictionnaires... à des prix divers. Ils sont nombreux : traductions, originaux, dictionnaires... et vos associations, comme Esperanto 94, peuvent vous les fournir. Sur Internet on peut aussi consulter des catalogues.</p>	<p>Por festi la finon de 2010 kaj komencon de 2011, ĉu vi pensis ke libroj pri aŭ en Esperanto estas agrablaj kaj utilaj donacoj ? Por jam esperantistoj sed ankaŭ por ne esperantistoj por informi ili, eĉ instrui la lingvon danke al tre bonaj lernolibroj, vortaroj... je prezoj tre diversaj.</p> <p>Ili multnombras : tradukaĵoj, originaloj, vprtaroj... kaj viaj asocioj, kiel Esperanto 94, povas al vi ilin provizi. Ĉe la reto eblas ankaŭ konsulti katalogojn.</p>

UNE LISTE D'EDITEURS DE GOOGLE LISTO DE ELDONEJOJ KIUN APERIGAS GUGLO

Kava-Pech - <http://www.kava-pech.cz/> Ĉeĥa kongresa kaj eldona entrepreno informas pri aranĝoj kaj libroj. Ofertiĝas ĉeĥaj kaj esperantaj libroj (lingva literaturo, faka literaturo kaj beletro).

Edistudio - <http://www.edistudio.it/> Itala eldonejo prezentas siajn librojn kaj revuojn

Eldona Fako Kooperativa de SAT - <http://www.satesperanto.org/eldonkooperativo/> La fako de Sennacieca Asocio Tutmonda eldonas klerigan materialon

Eldona Societo Esperanto - <http://www.algonet.se/~eldona/> Sveda entrepreno kun pli ol 80-jara tradicio. Ofertas legolibrojn, lernilojn, kasedojn kaj vortarojn (interalie la kvinvoluman Etimologian Vortaron de Esperanto).

Eldonejo Mondial - <http://www.librejo.com/> La usona entrepreno ĉefe ofertas tradukitajn romanojn el la mondliteraturo.

Esperanto-Asocio de Finnlando - <http://www.esperanto.fi/eldonajoj.htm> Eldonas beletron, lernolibrojn kaj vortaron

Eldonejo Espero - <http://www.espero.sk> Ofertas librojn kaj KD-ojn pri Esperanto kaj ĝia literaturo, krome esoteran libron pri vojo al monda paco.

Eldonejo Hejme - <http://www.hejme.com.pl/> Eldona kaj kleriga firmao, funkcia de post 1991, eldonas interalie "Spegulon", socikulturana revuon.

Eldonejo Christian Bertin - <http://bertin.ifrance.com/> Franca entrepreno. Eldonas librojn pri komputilado, pri sciencoj, pri Bretonio kaj la bretona kaj la esperanta lingvoj.

Eldonejo Al-fab-et-o - <http://www.angelfire.com/co/alfabeto/> Sveda eldonejo de literaturo originala kaj tradukita, kaj krome de lerniloj.



Sezonoj - <http://www.esperanto.org/Ondo/Katalogo.htm> Libroj el Ruslando pri esperantaj historio kaj movado, scienco kaj tekniko, originala kaj tradukita beletro (Carroll, Conan Doyle, Tolkien, Simenon, Lermontov, Dostoevsky, Tolstoy, ktp.).

Impeto - <http://impeto.trovu.com/> Moskva entrepreno, kiu eldonas librojn en kaj pri Esperanto. Superrigardo pri aperintaj, aperantaj kaj aperontaj libroj.

Espero Publishing - <http://www.volny.cz/espero-publ/> La ĉeĥa eldonejo ofertas faklibrojn pri biologio.

Satamikaro : <http://www.esperanto-sat.info/rubrique29.html> : ampleksa kaj diversa libroservo

Esperanto-France <http://esperanto-france.org/documents/libroservo.PDF> : UEA en Francio



N'oublions pas non plus André CHERPILLOD (**Editions de la Blanchetière 73320 Courgenard**) qui édite ses propres productions, dont beaucoup de petites brochures en espéranto et même en français et dont nous avons déjà parlé dans nos bulletins. Sur Wikipédia on peut voir un certain nombre de ses titres, sur des sujets divers, voire historiques. http://fr.wikipedia.org/wiki/Andr%C3%A9_Cherpillod **et sur le site du groupe espérantiste du Mans : <http://asso.proxiland.fr/esperantolemans/default.asp?a=20615>**

RIONS UN PEU !	NI IOM RIDU !
<p>Un jeune homme réjouit dit à son ami :</p> <p>- J'ai battu un record ! - Ah bon, lequel ? - J'ai réussi à faire en 15 jours un puzzle sur lequel il était écrit « de 3 à 5 ans ».</p>	<p>Junulo ĝoje diras al sia amiko :</p> <p>-- Mi batis rekordon ! -- Bone, kiun ? -- Mi sukcesis nur en 15 tagoj, fari puzlon sur kiu estis skribite « de 3 ĝis 5 » jaroj.</p>



ILS ONT ETE FAVORABLES



Martti Ahtisaari, Prix Nobel de la Paix 2008: Les espérantophones visent à favoriser la compréhension mutuelle et la justice dans le monde en proposant un langage commun et neutre.



Gandhi: Je suis pour un calendrier uniforme pour le monde entier, comme je suis pour une monnaie commune pour le monde entier et pour une langue internationale comme l'espéranto pour tous les peuples du monde



François Mitterrand dans sa campagne pour l'élection présidentielle proposa l'apprentissage de l'espéranto à l'école secondaire.



Tito : Je pense que l'étude de l'espéranto est très nécessaire maintenant. L'espéranto a un caractère véritablement universel.



James Harold Wilson, Premier Ministre du Royaume Uni dans la période 1964-1970 et 1974-1976, parlait l'espéranto.

A L'USAGE DE L'ESPERANTO



Jacques Chirac, avant sa réélection en tant que président de la France, a promis de soumettre au gouvernement français, et en particulier au ministère de l'éducation, la question de l'adoption de l'espéranto comme matière facultative pour le baccalauréat, ainsi que de s'occuper du recrutement des examinateurs. Son intérêt pour l'espéranto semble être basé sur son désir de conserver la diversité culturelle, et sa conviction que l'espéranto serait un facteur important à l'égard de l'harmonie et de la compréhension.



Pelé: L'espéranto sera très utile pour tous les sportifs afin de faciliter des relations plus étroites et se faire des amis.




Tolstoï: Le temps nécessaire pour apprendre l'espéranto est si petit, et les résultats de son apprentissage potentiellement si grands, qu'aucune personne cultivée ne devrait rejeter la possibilité de le faire.

ILS NE SONT PAS LES SEULS, MAIS IL RESTE ENCORE BEAUCOUP A FAIRE. POUR CELA IL FAUT SANS CESSE AGIR
ILI NE ESTAS LA SOLAJ, SED RESTAS MULTO FAROTA. PROE NECESAS AGI SENĈESE.



En 1913



RIONS UN PEU !

Monsieur Aubergine demande à son ami Leradis :
 -- Pourquoi restes-tu sur le balcon, lorsque ta belle-mère chante?
 -- Pour que les voisins ne pensent pas que je suis entrain de la battre !



NI IOM RIDU !

Sinjoro Melongeno demandas al sia amiko s-ro Rafaneto:
 -- Kial vi pozas sur la balkono, kiam via bopatrino kantas?
 -- Tial, por ke la najbaroj ne pensu, ke dume mi batadas ŝin !

Le coin des collectionneurs
Angulo de la kolektantoj

esperanto *Aktiv'*
Lettre d'informations mensuelle
éditée par Esperanto-Jeunes et Esperanto-France

En 2011, d'autres auront lieu
En 2011, aliaj okazos

[http://esperanto-france.org/esperanto-](http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-9-decembre-2010)

aktiv-9-decembre-2010

Une revue à consulter sur le net, dont voici quelques informations diffusées en fin d'année 2010. Intéressante à consulter et aussi pour connaître les événements d'actualité.

Le 15 décembre 1859 naissait L. L. Zamenhof qui fut à l'initiative de l'espéranto. C'est l'occasion pour nous de revenir sur quelques épisodes de l'histoire de l'espéranto, par la présentation de quelques sources intéressantes et documents disponibles sur Internet : collections de cartes postales ou de timbres, documents d'archives (correspondance de Zamenhof, documents audiovisuels « enregistrements de Zamenhof, -la Espero-, hymne de l'espéranto », livres anciens, musées consacrés à l'espéranto...

...lire la suite en ligne

Retrouvez les récents événements français liés à l'espéranto :

- tournée de conférences de Etsuo Miyoshi, mécène japonais qui a fait paraître le 15 décembre 2010 une double page d'information sur l'espéranto dans le journal « *Le Monde* »,
- initiative de la société Triballat qui, aidée de la compagnie LinguaForce, a présenté un de ses produits Sojasun avec un emballage tout en espéranto.

Chez les associations locales : : concours de dessin pour enfants (centre culturel Saint-Nazaire-Espéranto), l'exposition à la bibliothèque communale de Ribérac (24) (lors de la parution d'une BD sur la grotte de Lascaux traduite en espéranto), Espéranto-Indre et la Journée des droits de l'enfant (campagne de sensibilisation à la non-violence), soirée cabaret en espéranto à Changé (72), la 16e édition des « Cafés Espéranto » à Paris, les stages, cours et séminaires sur l'espéranto...

...lire la suite en ligne

Le 15 décembre est la Journée Zamenhof et la Journée du livre à proximité de la Journée Mondiale des droits de l'homme, le 10 décembre : occasion de parler de nos droits linguistiques !

Et pour les fêtes de fin d'année en parlant espéranto, plusieurs rencontres, en France ou en Europe : réveillon du Nouvel An au château de Grésillon (49) ou en Allemagne, à Burg (Spreewald, JES (Semaine pour la jeunesse, des fédérations allemande et polonaise de jeunes espérantophones), 27e Festival international à Nördlingen (Bavière), Saarbrücken, avec deux rencontres, NR (Nouvel An pour adultes et familles) et NIS (plutôt destinée aux jeunes), en Allemagne, SANO, « Nouvel An et médecines douces.

...lire la suite en ligne

Reta revuo por konsulti, kies jen kelkaj informoj kiuj aperis fine de decembro 2010. Interesaj por konsulti, ankaŭ por koni aktualajn eventojn.

La 15an de decembro 1859 naskiĝis L. L. Zamenhofo, kiu estis la iniciatinto de Esperanto. Estas okazo por ni reparoli pri kelkaj epizodoj de la historio de Esperanto per prezento de kelkaj interesaj fontoj kaj disponeblaj dokumentoj en la reto : poŝtkartajn kaj poŝtmarkajn kolektaĵojn, sed ankaŭ arkivojn de dokumentoj, (korespondajon de Zamenhofo, aŭdo-vidajn dokumentojn « registraĵojn de Zamenhofo, -La Espero-, himnon de Esperanto », malnovajn librojn, muzeojn dediĉitajn al esperanto.

...Legi la sekvon en la reto

Retrovu la eventojn litigitajn al Esperanto kaj kiuj okazis antaŭnelonge en Francio :

- la turneo de la japana meceno Etsuo Mijoŝi, japana mecenato, kiu aperigis la 15an de decembro 2010 duoblan informpaĝon pri Esperanto en la ĵurnalo « *Le Monde* ».

- Iniciato de la firmao Triballato, kiu, helpita de societo « *LinguaForce* », prezentis produkton « *Sojasun* » kun pakajo tute en Esperanto.

Ĉe la lokalaj asocioj : desegnokonkurso por infanoj (Kultura centro de St Nazaire-Espéranto), ekspozicio ĉe la urba biblioteko de Riberako (24) (okaze de eldono de Bildostrio pri la grotto de Laskaŭo, tradukita en esperanton, « *Esperanto-Indre* » kaj la tagoj de la infanrajtoj (kampanjo por instigi rifuzi violenton), vespera kabareto en Ĉanĝeo (72), la 16a kunveno de la « *Café esperanto* » en Parizo, la staĝoj kaj la seminarioj pri Esperanto.

...Legi la sekvon en la reto

La 15a de decembro estas tago de Zamenhofo kaj la tago de la libro en proksimeco de la Monda Tago de la homaj rajtoj, la 10an de decembro : okazo preparoligi pri niaj lingvaj rajtoj.

Kaj por la jarfinaj festoj parolante Esperanton, pluraj renkontiĝoj, en Francujo kaj Eŭropo : Noktofesto de la novjaro en kastelo Greziljono (49) aŭ en Germanio, en Burgo (Spreewald JES (semajno por la esperantaj junuloj de la germana kaj pola federacioj de junaj esperantistoj), 27a internacia festivalo en Nordlingeno (Bavière), Sarbrukeno, kun du renkontiĝoj, NR (Novjara, pli por plenkrekuloj kaj familioj) kaj NIS (pli por junuloj), en Germanio, SANO, Nova jaro kaj dolĉaj kura-cadoj.

..Legi la sekvon en la reto

RIONS UN PEU

Un facteur porte une lettre à une auberge alpine. Epuisé de la longue montée, essoufflé et d'humeur morose, en grognant, il remet le pli au destinataire.

-- Mon cher Hans ! --Lui dit l'aubergiste-- Si tu continues à toujours rouspéter pour des lettres très rares, je vais m'abonner, crois-moi, à un quotidien !



NI RIDU

Poŝtisto portas leteron al iu alpa gastejo. Elĉerpita pro la longa grimpad, anhelanta kaj sufiĉe moroza li grublante transdonas ĝin al la ricevanto.

-- Kara Hanso! -- komencas la gastejestro. -- Se vi daŭre estos ĉiam tiel grumblema pro tre maloftaj leteroj, mi abonos, kredu min, tagĵurnalon!